Skövde la 28:an de junio 1945.

S-ro Jan Strönne (nur al Str.)

Malmö.

Frato!

Vian leteron de la 22.6. mi danke ricevis. Pri la Sv. Esp. Gaz., kies problemoj vere estas tre solvendaj (ĉu vi uzas -end-?), mi ne havas tempon, momente nek volon diskuti. Mi fidas je viaj klopodoj tiurilate kaj esperas je sukceso. Nun mi nur aldonas kopion de artikolo, kiu celas alvoki esperantistojn al aktiva kunlaboro pri artikoloj propagandaj ĉi aŭtune.

Pri la afiŝoj.

Craemborn ne estas trovebla. Lia patrino sciigias al mi ĝuste la helsingborgan adreson; mi ne volis ŝin maltrankviligi - espereble la filo revenos. Nu, intertempe mi kontaktiĝis kun alia amiko, tre lerta reklama desegnisto, Olle Larsson, Skövde. Li ofte faras afiŝojn por tutlanda propagando de diversaj societoj.

Mi donis al Larsson du proponojn, nome Kontakt med världen kaj globo kun la nekompleta ĉeno. Li faros skizojn por afiŝoj 70 x 50 cm. Tiuj skizoj, kiuj havos kaj bildojn kaj tekstojn, estos senpagaj, kaj li prezentos ilin samtempe kun sia oferto. Larsson intencas fari la afiŝproponojn por litografia preso; eble tia produktado iom pli kostas, sed ĝi multe pli efikas ol kliŝo/kompostomaniero. Bv vidi la belajn afiŝojn, kiujn uzas diversaj societoj por tutlanda propagando, bontemplanoj, Norgehjälpen ktp.

S-ro Larsson eble povas presenti al mi la proponojn la 6:an de julio. Se jes, mi sendos ilin samvespere al vi. Alie mi povas sendi nur post la 22:a. Tamen ni certe povas esti tuj poste en ordo por mendo, havante plenan konsenton de la ceteraj estraranoj, ĉu ne?

Du afiŝojn ni havu ĉi-aŭtune, nepre! Poste ni celu, laŭmi, al eldonado de po unu afiŝo ĉiun jaron. Mi havas planon pri racia eluzo de la afiŝpropagando, por ke ĝi estu vera tutregna propagando. Pri la subbilda teksto (aŭ prop. por koresp. kurso aŭ loka propagando por kursoj, informoj) ni ankaŭ ĉi-jare iom diskutu antaŭ la decido. Fakte s-ro Larsson estas petata lasi tiun ekstratekston, kiun ni do devas alpresi laŭ posta decido.

Pri propaganda folio.

Mi jam scivolas pri viaj planoj. Ĉu vi komencis la prilaboron de la materialo? Vi certe faros tre "fortan" folion. Tamen mi volas doni kelkajn sugestojn. Jen! Ĉu vi intencas fari t.n. faldprospekton? Mi opinias ke jes! En tia faldprosp. ni eble devas havi kelkajn bildojn (kliŝojn). Ĉu ne estus eble uzi kliŝojn koresponde al unu el miaj afiŝproponoj, nome 1) s-ro, sidanta je skribotablo = koespondado, 2) ges-roj, starante ĉe bileta giĉeto kun valizoj kaj ekipitaj por vojaĝo = vojaĝoj, 3) s-ino, sidante en komforta brakseĝo, legante libron = literaturo. Tiajn kliŝojn oni eble povas trovi pretajn en Malmö ĉe taggazeto aŭ anoncoficejo; prunteblaj, se la koncerna posedanto rajtas presi. Pripensu la notojn.

Nun mi esperas, ke oni en Sthlmo pretigis kaj komencis la dissendadon de la materialo por Am. de SEF. Mi tamen nenion aŭdis, nek vidis.-Pri miaj taskoj mi konstante laboras/pensas. Post iu tago mi revenas pridiverse, i.a. mi prezentos mian liston pri diversaj aktualaj faroj en SEF. - Sufiĉu hodiaŭ. Ĝis...

kore, amike

ald.

INVITO AL AKTIVA KUNLABORO.

Iom post iom la estraro de SEF turnos sin al la esperantistoj, proponante diversspecan aktivan kunlaboron. Por la aŭtuna propagando en tiu ĉi jaro ni bezonas artikolojn por la gazetaro enlanda. Tiuj artikoloj devas esti esence fortaj el propaganda vidpunkto. Tamen devas esti nur reala, prudenta kaj por granda publiko tre alloga propagando, montrante la praktikan uzeblecon de Esperanto en la postmilita mondo. Sed samtempe oni devas doni sufiĉan spacon al la bela, interfratiga ideo de nia lingvo.

Inter la svedaj esperantistoj estas kelkaj, kiuj ĝis nun ofte prezentis tre valorajn artikolojn. Kun ili la estraro de SEF volas entrepreni efektivan kunlaboron. Sed estas ankaŭ multaj, kiuj interne de si portas bonajn ideojn tre sugestajn por formi valoran materialon propagandan. Vi estas do ĉiuj tre bonvenaj! Fortaj argumentoj estas ĉiam tre necesaj en nia propagandado. Ĝuste vi povas krei tiun valoran helpilon, kiun ni urĝe bezonas, ĉar vi post multjara aktiveco en la esperantista movado kolektis al vi grandan fondon tiurilate.

Ĉiu kunhelpu en la poresperanta laboro! Tuj ekskribu (svedlingve) vian kontribuaĵon, kiun la estraro danke akceptos. Adresu al Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, kaj nepre sendu antaŭ la 15:a de aŭgusto.

Vi kaj mi, kune ni fosu nian sulkon!